
LA DEKSEPA



Bulletin Mensuel Espérantiste
servi gratuitement aux membres de la Section du XVII^e Arr^t
du Groupe Espérantiste de Paris.

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : **H. de COPPET**
179, Boulevard Pereire, Paris.

ABONNEMENT : 1 franc par an. — Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :

Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

Groupe Espérantiste de Paris - Section du XVII^e Arrondissement

Réunions amicales tous les Mercredis soirs à 9 heures,
Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris. Entrée particulière.
Téléphone 530-16. Métro : Pereire.

Convocation.

Cher Samidean (in) o,

Vous êtes prié d'assister à l'Assemblée Générale Annuelle de notre Section. Cette assemblée aura lieu le Mercredi 18 Octobre 1911, à 9 heures précises du soir, Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris.

Veillez agréer, cher Samidean (in) o, nos cordiales salutations.

Pour le Comité de la Section :

Le Président :

HENRI DE COPPET.

Le Secrétaire :

ROBERT BOLLACK.

Ordre du jour :

- 1^o Compte-rendu moral de l'année.
 - 2^o Compte-rendu financier de l'année.
 - 3^o Consultation de l'Assemblée sur le mode d'affiliation de la Section à la S. F. P. E.
 - 5^o Questions diverses.
 - 5^o Election d'un tiers des membres du Comité.
-

Notre Dîner mensuel.

Le prochain Dîner mensuel de la Section aura lieu le Mercredi 8 Novembre 1911, à 8 heures précises du soir, Café de la Gare, 6, place Pereire, Paris. Prix : fr. 3,25 (boisson et pourboire compris).

Conférences

faites au siège même de la Section, 6, Place Pereire.

- 4-an de Oktobro. — S-ro R. Bollack : La monato esperantista.
11-an de Oktobro. — S-ro L. Oblin : Kongresimpresoj.
18-an de Oktobro. — Ĝenerala Sekcia Kunveno.
25-an de Oktobro. — S-ro H. Boulnois : Pieda vojaĝo.
8-an de Novembro. — S-ro H. Van Etten : La monato esperantista.
-

Cours d'Esperanto.

Notre président M. Henri de Coppet ouvrira, à partir du Jeudi 5 Octobre 1911, son cours élémentaire qui durera jusqu'à fin 1911. A partir 1912 ce cours « élémentaire » deviendra supérieur de sorte que vers Pâques, tous les samideanoj qui auront suivi ces cours *régulièrement*, seront en état de parler correctement et de se présenter à l'« Atesto pri Kapableco ».

Ces cours auront lieu tous les Jeudis soir, de 8 h. $\frac{1}{2}$ à 10 heures, Ecole Communale, 7, rue St-Ferdinand, sous les auspices de la « Société d'Enseignement Moderne ».

*
* * *


Notre secrétaire M. Robert Bollack ouvrira un cours d'Esperanto en Octobre, 85, rue de Vaugirard (Ecole Communale), le Mardi de 8 h. $\frac{1}{2}$ à 10 heures du soir, également sous les auspices de l'« Enseignement Moderne ».

En Beauvais.

La 25-an de Junio 1911 okazis en tiu urbo, la kutima jara festo de Jeanne-Hachette. Tre grava estas tiu festo kaj la urbo estas plena je aliurbanoj, do tre grava okazantaĵo en la tuta regiono.

Tiun jaron, la Grupo Esperantista de Beauvais organizis, la tagon mem de la festo, esperantan kunvenon. Ni estis multenombraj kaj sukcesplena estis la festo; akcepto de la esperantistoj en la urbdomo, de urbestro S-ro Desgroux, teatra prezentado, festeno, partoprenado de la esperantistoj ĉe la oficiala sekvantaro, ĉio estos por ni, estonte, la okazo pensi kun ĝojo al niaj amikoj de Beauvais. Laŭdinda devas esti la Prezidanto de la Grupo, S-ro Demarey, pro la bona organizado de la festo, kaj dankon ni suldas al li, ĉar en tiu kunveno, ĉe dum unu momento, la frata samideaneco ne ĉesis.

ROBERT BOLLACK.



Nia lasta promenado en « Saint-Nom-la-Bretèche ».

Eksterordinara sunradia vetero favoris tiun promenadon kaj ankaŭ nepriskribebla gajeco regis la tutan tagon inter la vicoj de la partoprenintoj.

La biciklistoj estis forveturintaj je la 8-a matene, ĉiu el ili havis sur sia masino la flirtantan verdan standardon, kiu multe efikis por la propagando dum nia veturado.

Plie, grandmodela standardo estis ĉiam defaldita kaj alkroĉita sur la enirejo de la restoracioj, kie ni haltis survoje.

La unua haltado okazis en « Roquencourt », ĉe la kafejo, kiu staras ĉe la kruciĝo de 4 vojoj, kaj kiu estis plene ĝa je sportaj vizitantoj. Kelkaj el ni mendis blankan vinon akompanata de kolbaso kun ajlo, tiu lasta tiel forte odoris, ke la muŝoj kaj vespoj, kiuj de kelkaj minutoj turmentis nin, tuj forflugis de la momento kiam oni deponis ĝin sur la tablon!

En « Saint-Nom-la-Bretèche », kie la pieduloj nin rekunigis, ni manĝis sub verda bosko kaj ni tiel ridis kaj ĝojis, ke la aliaj apartaj kunmanĝantoj vere enviis nin. Ne utile estas diri, ke ni disdonis flugfoliojn kaj ruĝajn broŝurojn al ĉiuj ĉeestantoj de la restoracio.

Posttagmeze, ni sterniĝis ombre sub la belegaj arboj de l'arbaro de « Marly », poste, oni ludis ĉiuspecajn ludojn kaj fine direktis sin piede al Bougival, kie estis okazonta la vespermanĝo.

Kia vespermanĝo! Tre certe, neniam en la Sekcio oni forgesos ĝin!

La plej vivega interparolado interrompita de oftaj ŝercaĵoj aŭ spritaĵoj daŭrigis la vespermanĝon ĝis la 11-a vespere, kaj kiam ni atingis la « Porte Maillot » la 12-a estis jam batinta !!!

Tiaj promenadoj multe efikas en ĉiuj rilatoj. Oni faras utilan propagandon ĉirkaŭ si kaj oni pli ŝatas sin reciproke per pli intima kunestado. Vivu nia kara Esperanto !!

H. DE COPPET.

Literatura konkurso de la « Dek-Sepa »

Literatura konkurso estas malfermata inter ĉiuj legantoj de la « Dek-Sepa » ĝis la fino de l'nuna jaro.

Nur originala 5-8 paĝa novelo, pri kiu ajn temo, kun eksklusiva uzo de la radikoj entenataj en la « Universala Vortaro » de la Fundamento estos akceptata.

1-a Premio Arta Objekto ;

2-a Premio-Medalo.

La manuskriptoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo kaj senditaj al la Redakcio de la « Dek-Sepa » kun la mencio : « Konkurso de la « Dek-Sepa » »

Avis important

A tout membre de notre Section qui aura fait inscrire 10 nouveaux membres *ayant payé leur cotisation*, la Rédaction de ce journal fournira une carte spéciale, avec laquelle il pourra aller dans presque tous les théâtres de Paris à demi-tarif.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

LA VERA TIZANO DE L' PASTRO DE DEUIL

preparita de S-ro Duvergier, en Argenteuil, mirinde efikas kontraŭ ĉiuj doloroj, reŭmatismoj, neŭralgioj, kontraŭ la aĝatakoj, la mallakso kaj la grasegeco.

La paketo : 1 Fr. 50 (Sm. 0,60)

Tuj ricevebla kontraŭ poŝtmandato.

Specimeno kaj broŝuro senditaj senpage tuj post demando al
S-ro DUVERGIER, 9, Rue Laffitte, Paris.

Parolo de D-ro L. L. Zamenhof

ĉe la malfermo de la Sepa Kongreso Esperantista.

Kiel tradicia malfermanto de la kongresoj esperantistaj, mi permesas al mi esprimi en la nomoj de ĉiuj kongresanoj nian respektan kaj sinceran dankon al lia reĝa mosto la reĝo Alberto por la granda honoro, kiun li faris al nia afero, prenante sur sin la protektantecon super nia kongreso. Mi esperas, ke mi esprimos la deziron de ĉiuj kongresanoj, se mi proponos, ke ni sendu telegrafe nian diversgentan saluton al la regnestro de la lando, kies gastoj ni estas, kaj nian dankon al nia alta protektanto. Mi esprimas ankaŭ en la nomo de la kongresanoj nian koran dankon al la urbestro de Antverpeno, kiu afable donis al ni sian helpon kaj moralan apogon. Fine mi esprimas nian koran fratan dankon al tiuj niaj belgaj samideanoj, kiuj tiel laboreme kaj zorge pretigis nian grandan feston.

Mi uzas ankaŭ la okazon de nia festo, por revoki en vian memoron la nomon de unu viro, kiu havas grandegan meriton en nia afero. La prelato JOHANN MARTIN SCHLEYER, kies nomon ĉiu el vi konas tre bone, la aŭtoro de Volapük, antaŭ nelonge festis la okdekjaran datrevenon de sia naskiĝo, kaj estus nepardoninde, se ni ne uzus la okazon de nia nuna ĝenerala kunestado por esprimi al li tiujn sentojn, kiujn ni ĉiuj havas por li. Li estas la vera patro de la tuta internacilingva movado. Antaŭ li oni ankaŭ revis pri lingvo internacia, oni provis labori por ĝi; sed tio estis nur teoriaj skizoj, palaj senkorpaj fantomoj en la regiono de revoj. Li estis la unua, kiu diris al si: por lingvo internacia mi volas ne *revi*, sed *labori*; dum ĉio ĉirkaŭe dormis, li estis la unua, kiu praktike kreis la internacilingvan *movadon*. Volapük ne estis venkita de Esperanto, kiel multaj personoj pensas tute erare; ĝi pereis *per si mem* en tiu tempo, kiam la trankvile kaj senartifike laboranta Esperanto estis ankoraŭ tro malforta, por iun venki; ĝi pereis ne pro sia stranga sonado aŭ pro aliaj similaj kaŭzoj, ĉar al ĉio oni povas alkutimiĝi, kaj kio hieraŭ ŝajnis sovaĝa, tio morgaŭ aperas kiel io tute natura kaj bela; per longa kaj multespeca uzado eĉ la plej sovaĝa idiomo de la plej barbara gento iom post iom fariĝas rica, eleganta kaj oportuna lingvo.

Volapük pereis ĉefe pro *unu* grava eraro, kiun ĝi bedaŭrinde enhavis: *absoluta manko de natura evolucifovo*; kun ĉiu nova vorto aŭ formo la lingvo devis konstante dependi de la decidoj de unu persono aŭ de facile inter si malpaconta personaro. Kiel sur bastono plantita en teron, novaj branĉoj kaj folioj ne povis nature kreski sur ĝi, sed devis esti konstante skulptataj kaj algluataj. Se ne ekzistus *tiu* eraro, kiun korekti oni bedaŭrinde ne povis, Volapük neniam pereus kaj ni ĉiuj nun versajne parlus volapŭke. Sed tiu bedaŭrinda eraro, kiun kaŭzis ne manko de talento kaj de laboremece, sed nur tro rapida publikigo de la lingvo, sen sufiĉe matura elprovado, — tiu eraro, kiu pereigis Volapükon, neniel malgrandigis la meritojn de ĝia aŭtoro, kiu la unua potence skuis

la mondon por nia ideo; la grandaj meritoj de Schleyer en la internacilingva historio neniam malaperos.

Mi proponas al vi, ke okaze de la festo de Schleyer ni telegrafe sendu al li en la nomo de la tuta esperantistaro nian koran gratulon, nian dankon por lia granda laboro kaj nian deziron, ke li vivu ankoraŭ longe kaj havu la konscion, ke la fruktoj de lia laboro neniam pereos.

Karaj amikoj! Mi staras hodiaŭ antaŭ vi ne esperinte. Ĉar la stato de mia sano estis tro malbona, mi decidis ne veturi al la kongreso de ĉi tiu jaro. Tamen en la lasta momento mi devis ŝanĝi mian decidon, ĉar mi rimarkis, ke la projekto, kiun mi prezentis por diskutado dum la Sepa Kongreso, ne de ĉiuj estas ĝuste komprenita kaj eble bezonas klarigojn de mia flanko. Tial ne miru, ke mi prepariĝis paroli antaŭ vi pri ia speciala temo, sed mi tuŝos nur per nemultaj vortoj tiun demandon, kies pridiskutadon dum la kongreso mi proponis al vi. Mi ne antaŭvenos vian decidon por aŭ kontraŭ la diskutota projekto, mi volas nur diri kelkajn ĝeneralajn vortojn, por instigi vin bone kaj senpartie prepariĝi por la venontaj diskutoj.


Ekzistas en nia afero demandoj, kiuj povas esti solvataj ne de iu aparta persono, ne de iu aparta nacia asocio, ne de iu aparta institucio, sed nur de la tuta esperantistaro; ekzemple la demandoj pri nia Lingva Komitato, Konstanta Kongresa Komitato, k. t. p. Se iu volas fari simple konsilajn proponojn pri la interna agado de tiuj institucioj, li povas prezenti siajn proponojn al la estroj de la diritaj institucioj; sed se oni faras plendojn, se oni postulas reorganizon, anstataŭigon aŭ eĉ forigon de tiuj institucioj, — tiam al kiu oni devas sin turni? Aŭ se aperas iaj demandoj, kiuj koncernas la tutan esperantistaron, sed apartenas nek al la Lingva Komitato, nek al la Komitatoj de la Kongresoj, — tiam kiu havas la rajton ilin solvi? En sia privata esperantista vivo ĉiu persono aŭ grupo aŭ asocio estas kompreneble tute liberaj kaj povas agi, kiel ili volas kaj povoscias; sed pri ĉiuj demandoj, duboj aŭ entreprenoj, kiuj koncernas la tutan esperantan aferon, estas nepre necese, ke ni havu la eblon ĉiam scii la veran opinion aŭ deziron de la tuta esperantistaro. Esperanto ne estas ankoraŭ en tia feliĉa stato, ke ĉiu povu nur tiri el ĝi profiton, nezorgante pri la bonstato de la afero mem: ni devas kaj dum longa tempo ankoraŭ devos propagandi ĝin, kreskigi ĝin, defendi ĝin kontraŭ malamikoj; sed se ni ne havas la eblon regule interkonsiliĝadi, aŭ se niaj interkonsiliĝoj, farataj ne en orda parlamenta maniero, ne havas moralan valoron por la esperantistoj, ni similos organizon sen kapo kaj sen manoj, ni nenion povos entrepreni, ni staros senmove kaj malpacos inter ni mem.

Mi ne volas en la unua momento defendi la projekton, pri kiu vi en la plej proksimaj tagoj diskutos; tre povas esti, ke la projekto havas gravajn erarojn, kiujn via pridiskutado forigos; tre povas esti, ke la tuta projekto montriĝos neakceptinda, kaj tiam — vi scias tion tre bone — mi ne penos altrudi ĝin al vi, kiel mi neniam ion al vi altrudis. Nur pri

unu aferon mi kore vin petas : kion ajn vi decidis, — ni ne fermu nian kongreson antaŭ ol ni en tia aŭ alia formo faros ian arangon, kiu donos al ni la eblon almenaŭ unu fojon en la jaro solvi ĉiujn kolektigintajn disputojn aŭ dubojn en lojala interkonsento kaj konforme al la vera deziro de la tuta esperantistaro.

La arango de regula kaj rajtigita kongresa voĉdonado, kiun mi proponis al vi, aŭ ia alia simila arango, kiu eble rezultos el via diskutado, ne estos ia nova institucio kaj per si mem ne sangos la iradon de nia afero; sed ĝi donos al ni la forton de ordo kaj de solidareco. La institucioj, kiujn ni kreis, aŭ eble ankoraŭ kreos, ĉesos havi la karakteron de ia privataĵo, kiun neniu subtenas kaj multaj atakas. Ili havos rajton diri al la esperantistaro: se ni estas bonaj, respektu nin kaj subtenu nin; se ni estas malbonaj, reorganizu nin aŭ forigu nin. Ĉiu esperantisto scios, al kiu plej alta instanco li devas sin turni, se tio aŭ alia en la komun-esperantistaj aferoj ne plaĉas al li, kaj oni ne ĉesos konstante sin turnadi al mi, kiu hodiaŭ vivas kaj morgaŭ povas ne vivi, kaj kiu cetere havas nek rajton nek deziron solvi ĉiujn disputojn propradecide.

Ni komencu nian feston kaj ankaŭ niajn laborojn, al kiuj ni dediĉu nian plenan atenton kaj senpartiecon. Se el niaj laboroj rezultos la enkonduko de preciza ordo en nian aferon, tiam la kongreso Antverpena estos unu el la plej gravaj inter niaj kongresoj. Tion ni esperu. Ĉiu el ni havu la firman decidon helpi per ĉiuj fortoj al la enkonduko de ordo kaj forigo de ĉiu malpaco en nia afero. Kun tiu firma kaj solena decido en la koro ni krii: vivu, kresku kaj floru nia afero!



Idilio en la Montoj.

Tri junuloj, unu Franca, unu Angla, unu Rusa, estis loĝantaj sur la supraĵo Alpa, ĉe Rigi-Kulma hotelo.

Ili intencis tie pasigi kelkajn libertempajn semajnojn.

Antaŭ la monato Aŭgusto, ĉiu tute nesciis, ĉu vivis iu el ili. Sed, ĉar ili renkontigis en la vagonaroj, ĉe manĝotablo, aŭ en la koridoroj de la hotelo, fine ili iom post iom amike kunligigis. Ĉiuj tri estis fortaj, gajaj kaj bone marsadantaj; tial tiu ligo amikema ĉirkaŭ ili rapide premiĝis.

Tamen estis malhelpo inter ili.

Ili estis tri; sed du nur povis facile interparoli. La Ruso parolis france al la Franco kaj angle al la Albionido: sed li ĉiam estis devigata fariĝi tradukisto, kiam la Franco kaj la Anglo deziris intersanĝi kelkajn pripensojn. Tiuj ĉi do estis tedataj, kiam neceso ilin devigis peti la helpadon de la juna

Ruso. Tiam ili ofte penadis interparoli per gestoj, grandaj brakaj movadoj, mimiklingvoj, grimacoj ne ordinaraĵoj kaj krioj laringaj. La Ruso ilin lasis gestigantaj, ridetis interne, kaj tute ĝojis, kiam li vidis siajn du kunulojn ruĝajn, ŝvitantajn kaj spiregantajn, kiuj fine lin petegis por ke li traduku bonvole iliajn ideojn.

Dank' al li, ili povis ekpensi pri planoj de vojaĝetoj: kaj ĉiutage fariĝis frenezaj kuradoj tra monto, ebrieco de pura aero, plezuroj senĉese renovigitaj, en komuniigo kun naturo bela. Kiel ili estis feliĉaj, kiam ili partigis ilian miron fervoran inter ĉiuj mirindaj vidaĵoj de Svislando: iliaj koroj hatiĝis agorde; kaj neniu nuboj levigis en klara ĉielo de ilia amikeco sincera.

Unu someran vesperon, ili, per brakoj kunligitaj, estis malsuprenirintaj ĝis Staffelon, la antaŭlastan stacidomon de la fervojo. Estis por ili granda amuzo iri tien, por vidi vojaĝantojn traveturantajn, kaj serĉi, ĉu, inter fremduloj alvenantaj, iu haltos, por sin loĝi ĉe ilia hotelo.

En vagoneto de unua klaso, ili tuj ekvidis junan fraŭlinon eksterordinare belan, kiun akompanis respektbla maljunulo. Ŝajnis ŝia vizaĝo inteligenta, kaj ŝia tuta persono bone edukita.

La tri amikoj fondkore deziris, ke la bela knabino nekonita aliros al granda hotelo por tie sin loĝi.

Ili petole suprenrampis kiel eble tiel rapide la lastajn deklivojn de la Rigia monto; ĉar ili volis scii, ĉu iliaj deziroj devos baldaŭ efektiviĝi.

Sed vane ili rapidegis. Kruroj dudekjaraj estas venkotaj de la vagonaro, ĉe kiam ĝi malrapide veturas. Kaj kiam ili alvenis sur la supraĵo de la monto, ili nenion povis scii pri la estonto de la juna fraŭlino kaj de ŝia akompananto.

Malgraŭ tio, ĉiu promesis al si mem, fari kelke da tualetoj, ĉu okaze lin renkontos la bela vojaĝantino.

Morgaŭe, ĉe la manĝotablo, la Anglo distingigis per la korekteco tute rimarkinda de ŝia vestaro. La Ruso havis kravaton nekredeblan kaj eksterordinare videblan, kaj la Franco nur unu floron en ŝia butontruo.

Kiam iu eniris, la junuloj maltrankvilaj zorge ekrigardis la vizaĝon de tiu ĉi nova vojaĝanto.

Fine ili vidis, enirantan en la grandan salonon, tiun fraŭlinon, al kiu ĉiuj pensadis, sed pri kiu neniu parolis.

La juna knabino, ripozinta je vojaĝa laciĝo, estis ankoraŭ pli bela. Grandaj okuloj nigraj lumigis al vizaĝo malko-

lora; buŝo ŝajnis granata floro; talio fleksebla belmove kurbigis; kaj ŝia ireco aperis tute plaĉinda. Antaŭ tiom da mirindaj vidaĵoj, la junuloj restadis blindigitaj, kaj perdis tute malsateton.

— Feliĉe, diris la Ruso, mi scias kvin lingvojn, la rusan, la francan, la anglan, la germanan kaj la polan; sekve mi povos facile interparoli kun la bela fraŭlino nekonita.

— Ne, respondis la Parizano; ŝi vin ne komprenos, ĉar mi aŭdis ŝin parolantan al ŝia patro; kaj ŝi estas nek Hispanino, nek Italino.

— La angla estas la universa lingvo, certigis la Albionido; mi do sola havos la ŝancon paroli al tiu ĉarma fraŭlino. Plie, se ŝi estas okaze Italino, mi konas sufiĉe tiun lingvon por provi kelkajn frazojn.

— Sed kiu do vin prezentos, mia kara? petis la Ruso furioze.

— La cirkonstancoj. Mi zorge observos la okazojn. Vi povos hodiaŭ promeni sen mi; mi ne foriros el la hotelo.

— Jen estas nia trio duonrompita, murmuris la Parizano. Ĉu ni bezonis zorgi pri tiu knabino, kiu ne nin atentis pli ol la lumigilojn de tiu ĉi salono.

— Tio estas tute malsaĝa, ekkriis la Ruso.

Samtempe li serĉis en sia cerbo, ĉu hazarde li ne trovis ian servon, kiun li povus fari al la juna knabino. Ĉar, se tio okazus, li tiam parolus al ŝi, dank' al siaj kvin lingvoj.

La promenado estis malĝoja por la du amikoj; kaj vespere, dum la vespermanĝo, iliaj vestaroj sin montris ankoraŭ pli brilaj, ol antaŭe matene, dum la tagmanĝo.

La Anglo estis malesperanta, ĉar la fremdulino ne komprenis unu vorton ĉu anglan ĉu italan.

La juna knabino faligis sian ventumilon. Tuj la Ruso rapidis, volante ĝin redoni al ŝi; kaj li provis komplimenton ruse. Vidinte la okulojn mirantajn de la fremdulino, li daŭrigis france, poste germane, fine pole. La bela fraŭlino klinigis belmove, sed silentis, ne kompreninte iun el la kvar lingvoj parolitaj de rusa junulo.

Tiu, malkontente, leviĝis kaj reiris al sia loko.

Subite kato, kiu vagadis tra la salono, vidinte la ŝultrojn antaŭkurbatajn de la fraŭlino, alproksimiĝis inside kaj rapide eksaltegis sur ilin. La fremdulino timigita krion ekjetis kaj repuŝis sian seĝon, tute pala.

Sed la Parizano, kiu atente observis tiun farigon, ek-kaptis lerte la beston malĝentilan kaj diris esperante:

— Ne timu, fraŭlino, ni ĉiuj estas tie por helpi al vi.
Subite la vizago de la bela knabino lumigis.

— Ha! danke, sinjoro, ekkriis ŝi; mi sentas min feliĉa,
esti rekuraĝigita, precipe per esperantisto.

— Mi ankaŭ estas tre kontenta, fraŭlino; ĉar ni povus
nin kompreni. Ĉu vi ne estas Hispanino? Ŝajnis al mi, ke
tiu sinjoro, via patro, kaj vi mem, estas parolantaj tiun
lingvon.

La fraŭlino respondis per unu kapa kliniĝo: kaj la res-
pektinda maljunulo partoprenis al la interparolado.

Li rakontis, kiel li estas feliĉa, parolante tiun mirindan
lingvon internacian, kiu devos kunigi ĉiujn popolojn en sama
kaj vera fratigo.

Dum tiu interparolo, la Anglo kaj ŝia amiko eliris sen-
adiaŭe, laŭ la angla kutimo: dum la Ruso balbutis:

— Se anstataŭ ellerni malfacile kvar lingvojn fremdajn,
ekster mia patrino, mi estus studinta la solan vere interna-
cian, mi certe estus nun multe pli bone inspirita. Tiu Franco
sola estis prava.

Tamen la Parizano, benante Esperanton, refaris novan
trion kun la aminda maljunulo kaj kun la belega kaj ĉarma
Hispanino. Kaj tiu ĉi dua interligo estis multe pli agrabla,
ol la unua: ĉar ĉiu sin komprenis. Eĉ, oni povus aldoni, ke
du koroj korbatis agorde kaj esperante.

M. VALLIENNE.



KONTRAŬ
**MAR-
MAL-
SANO**

DELPHININE

De l' DOKTORO FLASSCHEN.

KONTRAŬ
**FERVOJ-
MAL-
SANETO**

Tiu ĉi farmaciaĵo, absolute sendanĝera, ricevis la **Grandan
Premion** ĉe la Internacia Ekspozicio de Higieno, okazinta en
Parizo en 1908.

Prezo de la boteleto : 10 fr. (4 S).

Aĉetebla ĉe S-ro WEITZ, 8, Rue de Duras, Paris
kaj ĉe ĉiuj farmaciejoj.

Moustiques ! Moustiques !! LE MOUSTIKOL

(Déposé)

Supprime instantanément les Démangeaisons occasionnées par les piqûres de **MOUSTIQUES, GUÊPES, PUNAISES, PUCES**, etc. — Le flacon : 1 fr. 50.

Vente en Gros : **PIOT & LEMOINE**, 117, rue Vieille-du-Temple, Paris.

Pharmacie des Deux Mondes

A. LÉGER, Pharmacien de 1^{re} classe

2, Rue des Tournelles - Bastille - Rue St-Antoine, 8

PRIX LES PLUS RÉDUITS

Livraison tous les jours dans PARIS et en BANLIEUE sans augmentation de prix. — Expéditions en PROVINCE.

Demander le **Catalogue** accompagné d'un petit manuel de *Médecine* et de *Pharmacie*, envoyé **gratis** et **franco** sur simple demande.

HYGIÈNE de l'INTESTIN


CONSTIPATION



Echantillons gratuits sur demande.

Refuser les contre-façons comme on refuse la fausse monnaie.

Bien exiger la marque :
Chatel-Guyon
Miraton, France.



FARINE LAVILLE

FLEUR D'AVOINE LACTÉE

« L'aliment d'avoine convient en tout temps, à tout âge, et à toute sorte de tempéraments. »

LÉMERY

Ancien Doyen de la Faculté de Paris.

La Boîte : fr. 1,50, dans toutes Pharmacies et Herboristeries.



Véritable
 Sel Ferrugineux
 assimilable
 DÉCOUVERT PAR
 M. Maurice ROBIN
 en 1881.

LE
Fer Robin

est Souverain
 CONTRE
 l'ANÉMIE,
 la CHLOROSE,
 les HÉMORRHAGIES
 DE TOUTE NATURE
 Active la nutrition et
 ne constipe jamais.

Chaque Flacon de ce médicament dépourvu de toute saveur, et qui se prend à la dose de 10 à 30 gouttes par repas, dans un peu d'eau ou de vin, représente une durée de trois semaines à un mois de traitement.

Pour éviter les Contrefaçons
EXIGER le Nom de **ROBIN**

VENTE EN GROS :
13, Rue de Poissy, PARIS

Le Gérant : E. OLLIVIER.